Nikolaus Lenau,

# Ĉiel-malĝojo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Migradas penso surĉielvizage,
La morna, griza, peza nubo jen;
Arbed' envente frenezulmalsaĝe
Sin ĵetas tien-renn en ĉagren'.

Eksonas bruo de l' ĉielo kiel
Malforta ĝemo de melankoli',
- okul' ploronta ekrigardas tiel, -
El ĝi ekbrilas febla lumradi'.

De l' marĉo fridaj trem-aeroj vente
Alblovas supererikeje nun;
De la ĉielo trista senatente
Elmane falis la lasita sun'.

*Traduko de la Germana poemo "Himmelstrauer" de* Nikolaus Lenau *(∗1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-627-1268 (2012-10-26 14:09:29)*

*Pri la poeto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau`.